



# SALUTON !

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

19 Novembro 2005

№ 14

Redaktoro: Araneo

**Adreso (provizora):**  
**Esperanto Societo de Ŝikago**  
**p/a Viktor Pajuk**  
**8228 O'Connor Dr., # 2F**  
**River Grove, IL 60171**  
**(773) 344-2276**  
**FAX: (708) 456-2750**

### Estraro:

Prezidanto – Roberto Stalzer  
Vicprezidanto – Karlo Offutt  
Eksprezidanto – Vilĵo Mannia  
Sekretario – Viktoro Pajuk  
Kasisto – Karlo Gunn

### Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;  
Familio \$30; Regula \$20;  
Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.

**Dues** are needed for the routine expenses of our Society.

Check should be payable to:

**The Esperanto Society of Chicago**, and mailed to our **Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada, Chicago IL 60607**

### Kunvenoj:

Membroj de la Ŝikaga Esperanto Societo kunsidas ĉiun kvaran merkredon de monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chikago, IL 60625-2101.**

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

**Bonvenon!**

Kara leganto! Mi ne kredas miajn okulojn, ŝajnas, ke antaŭ nelonge d-ro Kordylewski sendis al mi du numerojn de nia bulteno, datitajn de 2000/01 jaroj kaj jen aperas 12-a mia numero. Nekredeble! Mi planis aperigi ĝin fojfoje, laŭokaze, 4-6-8 foje dum la jaro, sed s-ro G. Dolgin preskaŭ konvinkigis min fari monatan bultenon. Danku lin pro reguleco kaj ĉi ofteco. Mi poste planis iom ripozi, kiel *ESPERANTO* aŭ *MONATO* (julie aŭ aŭguste) dum UK, sed ankaŭ tiu granda evento ne interrompis publikadon. Al s-ro Lesj helpis lia filo kiel kompostanto, ankaŭ al mi helpis filino-Arane-id-ino, kiu fake lernas komputor-aplikadon en iu universitato. Dank'al streboj de multaj helpantoj mi denove, kiel 12 monatoj antaŭe, informas vin pri la tradicia **Zamenhofa Bankedo** – ĉi jare ĝi okazos la 11an de Decembro (dimanĉe) en korea restoracio **Solga**, troviĝanta laŭ adreso: 5828 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60659 (tel. 773-728-0802). Ne forgesu pri la dato!

La sama s-ro Kordylewski, verkinte rememorojn de la lasta UK, skribis pri la longa “paŭzo” inter Vilna kaj antaŭlasta (por li) forumo – 18 jaroj. Oni povas pensi pri kabeo, sed vera E-isto neniam kabeas, eble, li (ŝi) iom retiriĝas, eble – ne aktivas, eble – ne aperas, sed la viruso estas nemortigebla, la infekto – nekuraceble, ĉu ne, ges-roj E-kuracistoj? E-spiriton elradiis filmo pri la lasta UK, ĝia aŭtoro, nia societano Walter Cebulski, kiu verkis artikolon por la lasta bultennumero, per sia filmo denove dum la lasta klubkunsido translokogis nin al la plej grava E-evento de 2005 kaj al urbo de siaj studentaj jaroj – Vilno.

Rolon de E-o en sia vivo ankaŭ substrekas akademiano Laŭlum, kiu vizitis nian urbon oktobre.

### E-akademiano - en Ŝikago

‘Ventan urbon’ vizitis TGP (tre grava persono) de E-movado, membro de E-Akademio, s-ro Li Shijun (Laŭlum). Kvankam li venis Usonon pro familiaj kialoj – lia nepino studas ĵurnalismen en Northwestern Universitato – li kontaktis kun la lokaj samideanoj kaj lin gasteme akceptis d-ino G. Novak kaj d-ro P. Chong. Laŭlum estas vera veterana adepto de IL, li esperantiĝis en fora 1939, li estas ankaŭ konata pro lia redaktado de belega monata revuo *El Popola Ĉinio* kaj kiel E-poeto, kaj tradukisto de multaj ĉinaj romanoj kaj epopeoj. Mi proponss al vi lian soneton, verkitan okaze de UK en Pekino en 2004 *Ĉe Yueyang-turo*:

En maja ventsusuro  
fieras Yueyang-turo  
ĉe l' vasta Dongting-lago,  
flustradas ondmurmuro.



#### UTILAJ ADRESOJ EN LA RETO:

Esperanto.Net –  
Home of a comprehensive FAQ list  
[http://www.esperanto.net/info/index\\_en.html](http://www.esperanto.net/info/index_en.html)

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course;  
toll free: 1-800-ESPERANTO  
(1-800-377-3726)  
<http://www.esperanto-usa.org/>

UEA – The Universal Esperanto Association  
<http://www.uea.org>

Free Esperanto Course on Internet  
<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course  
<http://www.mintex.demon.co.uk/espva/angla/index.htm>

Esperantic Studies Foundation  
<http://esperantic.org>

Pasporta Servo  
<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

AERA - Esperanto radio broadcasts in RealAudio format  
<http://osiek.org/aera/en.html>

Pola Radio en Esperanto:  
<http://www.wrn.org/audio/poll1.ram>

### Sekvantaj kunsidoj:

**30an de Novembro** – reelektakunveno: ni sumos la jaran agadon kaj estraro raportos pri sia aktivado; kune ni ellaboru planojn por la 2006 jaro (la nova estraro preparos sin al la Z-bankado)

### **11an de Decembro** **Zamenhofa** **Bankedo'05**

**25an de Januaro** – kio okazos en la jaro 2006 scias nur Dio

**26an de Aprilo** – XX datrevenon de Ĉornobila katastrofo en Ukrainio

La verdastela flago  
flirtadas dum la ago  
ekskursa kun plezuro,  
en E-kongresa tago.  
Senlima akva mondo!  
Vastega horizonto!...  
Prosperu nia afero  
jam tuj en la estonto!  
Ĉiuj en koopero  
strebadi kun espero!

Esperable, vizito de akademiano helpas al ni starigi kontaktojn kun la samideanoj el Pekino – ĝemelurbo de Ŝikago.

Alloke oni devas menciigi pri viglaj interŝanĝoj per bultenoj, kiuj okazis lastatempe inter nia societo kaj Milana (Italio) E-klubo. La kolektivo estas sufiĉe aktiva, eble, pro tiu en Milano, ne Romo, funkcias oficejo de la UEA-aliginta Landa Asocio. Pri Milano kaj Florenco – urbo de sekvanta UK – ni rakontos venontjare, kiam Milana EK festos sian centjariĝon.

### Lingva anguleto

La redakcio ricevis lingvan demandon, kio signifas E-e “doktoro” kaj ĉu usonan “M.D.” oni rajtas E-e nomi kiel “doktoro”. Jen kiel traktas tion PIV (SAT, Parizo, 2005):

**doktor/o 1.** Tiu, kiu instruas religion doktrinon. **2.** Persono posedanta la plej altan universitatan diplomon. **3. (familiare)** Medicina kuracisto. De tio sekvas, ke usonan terminon “doktoro” koncerne kuracisto oni devas traduki nur kiel kuracisto, sed ne – “doktoro”.

### Laste ricevita(j)

Kiel ni jam estis informanta, la redakcio ricevis:

1. Bultenon de la Milana E-klubo (nov.-dec. 2005) kun detala priskribo de la kluba agado kaj pri estontaj planoj.

Ankaŭ:

2. La lastan oktobran (2005, 5) numeron de la sveda revuo “La Espero”, kiu enhavas la tradukon de ukrainlingva rakonto “La brodita mondo” de Jurij Vinniĉuk, tradukis V. Pajuk.

3. Informilon de Ĝemelaj Urboj (n-rojn 2, 3, 2005) kun utila, laŭ mi, kontrakto inter franca Rennes kaj ĉeĥa Brno E-kolektivoj.

**Bedaŭrinde**, la redakcio ĝis nun NE ricevis kandidatproponojn por postenoj de prezidanto, vic-prezidanto, sekretario, kasisto. Ne forgesu viziti klubon por voĉdonado, kiu okazos la 30an de Novembro (ne 23an)!

**Sekvanta numero** estos dediĉita al:

– naskiĝtago de nia Majstro;

– Tago de E-libro (dua nomo por Zamenhofa tago) – vi ricevos informon pri du novaj E-libroj, iamaniere ligitaj kun nia societo.

Por vi serĉis la novaĵojn de la tuta E-mondo redaktoro kaj via obeema servanto. Estu sanaj kaj feliĉaj en ĉi maltrankvila mondo!



araneoesp @ yahoo.co.uk